

Skeĉo el *Ni ludas teatraĵojn* de Dansk Esperanto-Forlag
Claude Gacond, 420-a radioprelego, 1971.10.27 & 30

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni havis la okazon prezenti al vi la teatraĵon *La Reto* de Bukar, kiun ĵus eldonis Danks Esperanto Forlag. Apud tiu teatraĵo, kiu povas okupi tutan vesperon, kaj kiu estos ludata en Parizo ĉiuvespere dum tri semajnoj en la teatro **Absidiolo**, Dansk Esperanto Forlag ĵus eldonis mallongajn komikajn skeĉojn, kies celo estas krei gajan ekzercadon en esperanto-rondoj.

A.- Titolo de tiu skeĉaro : *Ni ludas teatraĵojn*. Aŭtoro : la ĉeĥo Tvarozek, kiu ricevis premiojn okaze de beletraj konkursoj.

Cl.- Jen unu el tiuj skeĉoj. Titolo: *Ĉe stratangulo*. Aktoroj: Pasanto kaj rabisto. La rabisto : *Bonan vesperon, sinjoro !*

A.- La pasanto : *Bonan...esperon...*

Cl.- *Sinjoro, ĉu vi ne vidis ie ĉi tie en la proksimeco policiston ?*

A.- *Policiston... ? Kial... ; Ĉi tie policiston ? Ne. Ili dormas nun... ĉiuj...*

Cl.- *Do, donu al mi rapide vian monon !*

A.- *M... mi ne havas !*

Cl.- *Vi mensogas. Hodiaŭ estis ĉe vi salajropago kaj vi havas vian salajron en la poŝo... !*

A.- *Sed... mi petas... sinjoro rabisto...*

Cl.- *La monon, rapide !*

A.- *Sinjoro, ĉu vi havas edzinon ?*

Cl.- *Ne babilaĉu ! Mi ne venis por konversacii kun vi pri familiaj aferoj. Donu tuj vian monon – tuj-tuj.*

A.- *Sed diru, mi petas, ĉu vi estas fraŭlo aŭ ĉu vi havas edzinon ?*

Cl.- *Pro kio ni nun parolu pri tio?*

A.- *Ĉar mi havas edzinon, kaj se mi venos hejmen sen mono, ŝi mortbatus min...*

Cl.- *Kaj ĉu vi pensas, ke la mia kisos min pro ĝojo, se mi nun venos hejmen sen mono ? Do, rapide donu al mi vian salajron !*

A.- *Sed, mi petas kompati min, estimata sinjoro rabisto... Ŝi ja frakasos mian kapon kaj ne donos al mi vespermangon...*

Cl.- *Tio ne interesas min. Mi volas, ke **mia** edzino ne frakasu **mian** kapon. Do, rapide !*

A.- *Sinjoro rabisto... mi petas vin... mia edzino ne kredos, ke iu forrabis de mi la monon... Ŝi pensos, ke mi ĝin tute fordrinkis...*

Cl.- *Tio ne interesas min !*

A.- *Mi petas vin... almenaŭ pafu unu truon en mian ĉapelon, por ke mi havu pruvajon, ke mi estis atakita kaj povis fari nenion...*

Cl.- *Ne babilaĉu ! Tio farus tro grandan bruon !*

A.- *Ne gravas. Proksime ne estas policisto, kaj mia edzino almenaŭ aŭdos ĝin... Mi loĝas proksime.*

Cl.- *Nu, bone.*

Skeĉo el *Ni ludas teatraĵojn* de Dansk Esperanto-Forlag
Claude Gacond, 420-a radioprelego, 1971.10.27 & 30

A.- (La pasanto tenas sian ĉapelon. La rabisto pafas.) *Bonege ! Ĝi eĉ odoras laŭ polvo ! Ankoraŭ unu truon, mi petas...*

Cl.- Nu, bone. (li pafas denove en la ĉapelon). *Sed nun la monon !*

A.- *Vi ne scias, kia drako estas mia edzino... Mi petas vin, ankoraŭ unu truon en la surtuton... Ŝi pli facile kredos... Mi estos ĝisoste dankema al vi !*

Cl.- *Vi estas terura poltrono... Oni min eĉ kaptos ĉi tie pro vi. Se mi mem ne havus tiel severan edzinon kaj ne havus komprenon pri vi kaj via situacio... Tenu la surturon !*

A.- *Nu, kio estas... ?*

Cl.- *Mi ne plu havas kartoĉojn...*

A.- (La pasanto alsaltas subite, elŝiras la revolveron el la mano de la rabisto) : *Ha, vagabondo, tiel vi do volas rabi kaj ŝteli !*

Cl.- (Li batas la kapon kaj vizaĝon de la surprizita rabisto per la ĉapelo, kiun li ankoraŭ tenas en la alia mano. La rabisto forturniĝas kaj ŝirmas sian vizaĝon per la manoj).

A.- *Labori vi ne emas, sed la rezulton de la laboro de aliaj homoj vi volus havi... !*

Cl.- (Li piedbatas la postaĵon de la rabisto. Tiu forkuras perdinte sian ĉapelon. La pasanto levas ĝin kaj tenante la sian sub la akselo, metas la ĉapelon de la rabisto sur sian kapon) :

A.- *Malgranda... tro malgranda...*

Cl.- (konstatas li malkontenta kaj forĵetas ĝin. Poste li reformas sian truhavan ĉapelon kaj metas ĝin sur la kapon. Nun li atente rigardas la revolveron kaj diras kontenta) :

A.- *Ankaŭ por ĉi tiu mi ricevos minimume cent kronojn.*

Cl.- Dum la vintraj kunvenoj de via grupo, se vi ne kuraĝas ekzerci veran teatraĵon kiel *La Reto* de Bukar, vi eble deziros ridi ekzercante la skecojn de *Ni ludas teatraĵojn* de Tvarozek. Eldoninto de ambaŭ libretoj : Dansk Esperanto Forlag.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-